

## Turisma itinero tra Israelo

**Jerusalemo** proponas inspiran panoraman vidon de la **Malnova Urbo** vidata de la Monto de Olivoj, loko de la preĝejoj *Pater Noster* kaj *Ĉiuj Nacioj (Getsemane)*. Vizitindas la Templo Monto, loko de la moskeoj la *Roka Kupolo* kaj *El Aksa*, la tria plej sankta por islamanoj. Tuj apude troviĝas la **Lamenta Muro**, restaĵo de la Heroda Templo, la judisma plej sankta loko. Trairu la **Via Dolorosa** pasante la Staciojn de la Kruco al la Preĝejo de la Sankta Tombo, loko de la krucumado kaj enterigo de Jesuo. Vagadu tra la Malnova Urbo, ĝiaj bazaroj, sonoj kaj aromoj, kaj provu marĉandi por trezoroj.

En la **nova urbo** de Jerusalemo, promenu tra la piedira strato *Ben-Jehuda* en la kvartalo *Nahalat-Ŝiva*, ĝuante tiun restaŭritan kvartalon de vendejoj, kafejoj kaj restoracioj. Vizitu la renovigitan **Israelo-Muzeon**, kie vi vidos la skribulaĵojn de la Morta Maro kaj multajn aliajn eksponaĵojn pri la israelaj historio, arto kaj kulturo. Ĝuu la pitoreskan kvartalon *Ejn-Kerem*, kun la bela Preĝejo de la Vizito kaj spektu la famajn Fenestrojn de Chagall en la apuda hospitala komplekso *Hadasa*.

**Jafo**, la malnova biblia havenurbo, ofertas multajn videndaĵojn, kiel la fiŝkaptista haveno, Preĝejo de Sankta Petro, la artista kvartalo, aŭdvida centro kun interesaj arkeologiaj trovaĵoj kaj historia spektaklo; kaj belega panoramo de Tel-Avivo.

En **Hajfa** vidu la paradizece belajn **Bahaajn Ĝardenojn** kaj vizitu la renovigitan *Germanan Kolonion*. Norde proksimas la malnova urbo de **Akko**, la Krucmilitista ĉefurbo kun imponaj muregoj kaj fortikaĵoj.

**Nazareto** – la infanaĝa urbo de Jesuo, kun la Baziliko de la Anunĉiaco; la Preĝejo de Sankta Jozefo, la Puto de Maria, kaj la Preĝejo de Sankta Gabrielo.

Traveturu la belajn Galileajn montojn, haltante ĉe la Nacia Parko *Arbel* por impona superrigardo de la **Lago de Galileo**. Ĉirkaŭ ĝi abundas kristanaj sanktaj lokoj: la Monto de Feliĉpromeso, Kapernaumo kaj Tabha (la situo de la miraklo pri fiŝoj kaj pano). Fine vizitu **kibucon** (kolektiva vilaĝo) ĉe la Lago de Galileo.

El Jerusalemo descendu pli ol mil metrojn al la **Morta Maro**, la plej malalta loko sur la Tero; preter la gastejo de la *Bona Samaritano* kaj la pejzaĝo de Jeriĥo al la Judea Dezerto. Haltu en **Kumran** - ruinoj de setlejo de juda sekto antaŭ du mil jaroj, en kies apudaj kavernoj estis malkovritaj la rulaĵoj de la Morta Maro, la plej antikva versio de la Biblio. Promenu tra la natura rezervo **Ein Gedi**, biblia oazo kun fontoj kaj akvofaloj. Trempu vin en la Morta Maro, la plej sala lago en la mondo, kiu estas tiom densa, ke eblas legi ĵurnalon flosante en la akvo. Prenu la telferon al la supro de **Masada** - scenejo de la epopea rezisto de la judoj fine de la ribelo kontraŭ Romio antaŭ preskaŭ 2.000 jaroj; unu el la plej gravaj simboloj de Israelo.

Iru suden al la **Ruĝa Maro** tra la Negeba dezerto kaj Arava-valo; al **Eilat**, suda haveno de reĝo Salomono kaj loko de eterna somero. Ni subakvumu al la mondo de koloraj fiŝoj kaj koral-rifoj, kaj migru tra buntaj kanjonoj kaj montoj por observi la mirindan pejzaĝon de la Golfo de Eilat kaj la 4 ŝtatoj: Israelo, Jordanio, Egiptio kaj Saud-Arabio. Apud Eilat vizitindas la *Hajbar*, dezerta rezervejo kie videblas multaj rehejmigitaj besto-specioj kaj la fama Nabatea roka templo de **Petra** en Jordanio.

